# KOMITATO-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

## dimanĉon la 10-an de oktobro 2021

### 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 10-an de oktobro 2021, de la 10a05 ĝis la 16a15, kunsidis parte rete kaj parte ĉeeste la Komitato de Espéranto-France.
[ĉeestas: S = fizike en la sidejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Michèle | ABADA-SIMON | MAS | Repr. de la membraro | S | | | |
| Alex | ANDRÉ | AA | Repr. de la membraro | | x | | |
| Véronique | BICHON | VB | Repr. de la membraro | | x | | |
| Bernard | CORNEVIN | BC | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Vincent | JACQUES | VJ | Repr. de la membraro | | | x | |
| Maurice | JUY | MJ | Repr. de la membraro | | | x | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | S | | | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | | x | | PQL |
| Christine | RAIFFAUD | CR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Emmanuelle | RICHARD | ER | Repr. de la membraro | S | | | |
| Axel | ROUSSEAU | AR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | S | | | |
| Paul | QUEVY-LEFEVRE | PQL | Repr. de la membraro | S | | | |
| Gilbert | STAMMBACH | GS | Repr. de fed. France-Est | | x | | BF |
| Marc | GIRAUD | MG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Florian | CEZARD | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | | x | |
| Clair | MAHÉ | CM | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Michel | DECHY | MD | Repr. de fed. Nord | | | x | |
| Laurent | PEUCH | LP | Repr. de fed. Bretagne | | x | | BF |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | S | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| Bertrand | SAJUS | BS | Repr. de FKEA | | | x | |
| Elisabeth | LE DRU | ELD | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | R | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | x | |
| Clément | BALEYTE | CB | Repr. de JEFO | | | x | |

14 komitatanoj ĉeestas el 26.

3 pliaj donis povon.
posttagmeze:
Christine forigis kaj donis sian povon al Emmanuelle
Michel Dechy alvenis sideje
Vincent Jacques alvenis rete

## ENKONDUKO

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj**

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto**
BF prezidas. ER protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**

0.4 **Decido pri la protokolo de la komitatkunsido de la 14-a kaj de la 15-a de majo 2021**
BF proponos ke estontece, la komitato validos la protokolon rete, sen atendi la venontan kunsidon

0.5 **Datoj de la venonta kunsidoj**
Komitato la 30an de januaro 2022, laborgrupoj sabate la 29-an

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Nova aliĝilo 2021-2022** **INFORMO**
Novaj monalvokoj en la aliĝilo, interalie ebla subteno al disdonado de MLA al lernejoj.
notinde, ke kelkaj kluboj kolapsis kaj do, ne plu estas en la sistemo FIK. Ni forigu ilin el la aliĝilo.

1.2 **Emeritiĝo de Susanna** **INFORMO**
Susanna anoncis en Julio, ke ŝi emeritiĝos en januaro 2022. Tio lasas al ni malmulte da tempo por anstataŭigi ŝin. Feliĉe estas propono: Saïd, la nuna helpanto de UEA, eble povos preni la postenon. Ni havas rendevuon ĉi-ĵaŭdon por intervjuo. Saïd estas 56-jaraĝa. Li ankoraŭ ne regas la francan lingvon sed lernas. Kaj li bone parolas Esperanton.
Ni tamen faros alvokon al volontuloj por tiu posteno.
Alia ebleco estas proponi al ŝi plu labori mez-tempe dum sia emeritado. Ŝi respondis, ke ŝi pripensos pri tio.
Problemo estas, ke la salajro ne estas tre alta, do malfacile estas trovi homon kiu akceptos la kondiĉojn.
Susanna alvenis kaj konfirmis, ke ŝi pretas transdoni ĉiajn informojn al sia anstataŭlo.

1.3 **Elekti reprezentanton de Espéranto-France ĉe KoToPo** **DECIDO**
Kelkaj kunvenoj povus okazi rete sed plej bone estas homo kiu loĝas en la Liona regiono.
BJ petos al Mickael Leibmann kaj Andrea Bertrand.
Demando pri la monalvoko farita de KoToPo: ĉ. 8000 € estis kolektitaj.

1.4 **Elekti reprezentanton de Espéranto-France ĉe EEU** **DECIDO**
Vincent Jacques, kiu estis reprezentanto nun opinias, ke “nova latino” povus esti pli bona rimedo ol Esperanto je la europa skalo. Li tamen estus feliĉa, se Esperanto iĝus komuna lingvo en Eŭropo.
Nuntempe, EEU ne multe aktivas. ĉar li havas alian projekton por komuna lingvo en Europo, Vincent konscias, ke li ne estas la plej bona homo por reprezenti Eo-F ĉe EEU.

Estos petata al Bastien Lacourt, kiu multe engaĝiĝis en la kampanjo pri estonteco de Eŭropo por Esperanto, ĉu li pretus reprezenti nin.

1.5 **Buĝeto por la nova jaro 2021-2022, financa stato, purigado de la kontoj** **INFORMO**

Sinprezento de Paul Quevy, la nova vickasisto. Dank' al sia sperto en banko, Paul detale studis la financan staton kaj malkovris diversajn erarojn kaj nekoherecojn.
Li devas ankaŭ redakti procedurojn por ĉio, kio rilatas al la kontoj.
Li ankaŭ substrekas la problemon de la stoko de la butiko, kiu estas sufiĉe granda. Tamen tio ne estas tiom simpla ĉar ni rimarkas, ke ju pli da malsalmaj artikoloj ni havas des pli ni vendas. Alia fakto estas, ke kiam ni eldonas, foje estas minimuma kvanto, ĉefe por libroj, kiel bildstrioj, kies fabrikado estas kosta.
Ekzemple, la stoko de vortaroj estas tre granda kaj malfacilas disvendi ilin (pro la pezo, la sendokostoj altas).
Donacoj: Espéranto-France ricevis multajn donacojn kaj heredaĵojn, kiuj ebligis konservi bonan financan situacion. Tamen, en 2021, ili malkreskiĝis.
Bruno proponas, ke la estraro laboru pri buĝeto, kiu estos prezentata por diskuto en la venonta komitatkunsido kaj por voĉdonado dum la venonta membrokunveno.

1.6 **Peto de monsubteno de Afrika Centro Mondcivitana por instruado de Esperanto en Benino** **DECIDO**

Temas pri programo de instruado de Eo en lernejoj kaj universitatoj. Vidu la dokumenton
https://docs.google.com/document/d/1PZZh5zM7eHwwfdj-dJ2xSA_i5SWLLNpc6QGvatVEtus/edit
Ni jam havas budĝeton por Afrika agado. Ni havas nun 4600 € en tiu linio, do sufiĉas por favore respondi tiun peton.
VOĈDONO: Ĉu la komitato konsentas uzi la disponeblan budĝeton por Afrika agado por tiu projekto?
kontraŭas: 0, sindetenas: 1, aliaj favoras
La propono estas akceptita.
AK transdonos la informon al François Hounsounou.

## 2. KONSCIIGO projektoj, ERIK (= Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Raporto de la laborgrupo pri redaktado de revuoj** **INFORMO**

Partoprenis 10 personoj, komitatoj kaj redaktantoj de revuoj.
C. Nourmont deziras ĉesi redatkti LME, do indas trovi aliajn homojn kaj solvojn por plu zorgi pri la revuo.
Proponoj:

- pluki informojn el diversaj publikaĵoj
- interŝanĝi informojn inter la redaktantoj
- krei komunan revuon por kunigi niajn fortojn
- havi komunan liston de kondiĉoj pri la revuo: kiel ĝi aspektus, kiu enhavo, kiuj zorgos, ktp.

2.2 **Raporto de la laborgrupo pri informado** **INFORMO**

La grupo parolis pri la disponeblaj iloj por komuniki inter ni: diskutlistoj, retaj socioj... Oni rimarkis, ke malgraŭ diversaj eblecoj, ne okazas multaj debatoj.
La grupo ankaŭ parolis pri la TTT-ejo de Eo-France, kiu regule estas ĝisdatigita, sed malfacile estas trovi informojn. Indas studi, kiel oni povus faciligi la vizitadon de la retejo, serĉado de informoj. Krei novan hejmpaĝon ŝajnas interesa rimedo.
Informado al ĝenerala publiko. Estus bone proponis trejnadon pri informado al la ĝenerala publiko kaj pri gazetaraj intervjuoj.
La ĉefa decido estas proponi aliajn kunvenojn por daŭrigi tiun laborgrupon. Venontaj kunvenoj povos okazi rete post dissendo de pli detala raporto pri tiu unua kunveno. (XG).

2.3 **Varbado**. Kiel kapti novajn membrojn? **DISKUTO**

Havi novajn membrojn signifas novajn esperantistojn, do ke ni instruu Esperanton.
Vincent pagis (po 2700 € ĉiumonate dum 5 monatoj) por varbi pri Esperanto kaj konigis Esperanton per gazetaraj intervjuoj, kaj li konstatis ke se oni uzas sufiĉe da mono, tio donas rezultojn.
200 artikoloj aperis, inter kiuj 15 gravaj.

2.4 **Prelegi pri Esperanto**. Peto de Renée Triolle : Ofte venas informoj pri seminarioj ks pri lingvistiko, tradukado, ktp. Bone estus havi esploristojn, fakulojn, ktp. **DISKUT**
Ĉu Espéranto-France listigis la kompetentulojn al kiuj mi povus sendi la informon por ke ili partoprenu pri prelego (aŭ almenaŭ sinproponu) por valorigi Esperanton?
Michel Dechy jam multe prelegis. Li pretas starigi liston de tiaj kompetentuloj.

2.5 **Informo pri la enketo pri fameco de Esperanto** **INFORMO**
La lasta enketo estis farita en 2009. Temas pri 3 simplaj demandoj.
Ĉu Esperanto-France povus instigi homojn voĉdoni por kandidatoj, kiuj favoras al Esperanto? Ne eblas, ĉar Eo-France estas sendependa de la politikaj partioj, tamen ĝi povus informi pri la fakto ke iuj politikistoj parolas favore al Esperanto aŭ ne. Alia ebleco estas rilati kun politikistoj okaze de baloto por informi pri Esperanto kaj instigi politikistojn esprimi (favoran) pozicion pri Eo. Temas tamen pri grandega laboro, kiu postulas grandan homforton. Kiu pretus ?

2.6 **Katalogo de la butiko** **INFORMO**
Ĝi preskaŭ pretas. Aldonitaj priskriboj de libroj novaj. ER atendas finan kontrol-legadon de Susanna kaj Jean-Louis. Ni aperigu la daton ĉe la kovrilpaĝo 2022.

2.7 **Agado de la komisiono "espéranto-langues" ĉe EELV** **INFORMO**

+ info UEA-EEU kampanjo

2.8 **Katedro ĉe la Universitato de Amsterdamo** **DECIDO**
(informo en la mesaĝo de Aleks de la 6-a de oktobro)
Peto, ke Eo-France donu ĉiujare 1000 €
VOĈDONO: ĉu ni aldonu linion en la aliĝilo por tiu donaco?
kontraŭas:0, sindetenas: 0
La propono estas akceptita.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 **Kongreso 2022** **INFORMO**
La kongreso planita en Trélissac (apud Périgueux) por 2021 okazos en la sama loko de la 26a ĝis la 29a de majo 2022.

3.3 **Kongreso 2023**: alvoko al kandidatoj **DISKUTO**
Rimarkoj: la dato (kutime semajnfino en majo) ne estas deviga.
Ĉu fari komunan kongreson kun SAT-amikaro? Se jes, tio signifus dum Pasko, ĉar ili ĉiam faras en la paska semajnfino. BF esploros kaj rilatos kun SAT-amikaro.

3.2 **Kongreso 2024** **INFORMO**
Eblus organizi komunan kongreson kun la Germanoj. Povus esti, ke Strasburgo estus kandidato, kaj povus esti ankaŭ, ke estos eŭropa kongreso. Tiam estos ebleceto ricevis subvencion.
BF esploros tion.

3.4 **Venonta reta festo**: ĉu organizi retan (aŭ fizikan) en decembro? **DISKUTO**

Estas malpli homoj. En decembro, estis 120 partoprenantoj,
en la printempa renkontiĝo 80 partoprenantoj, kaj hieraŭ 39 partoprenantoj.
Unu kialo estas, ke Mankis iom da varbado, ekz. ne estis en nia ttt-ejo, nek en la retejo eventoj
Venonta reta festo la 12-an de marto 2022, je la 18-a.

3.5 **Eldonado** **INFORMO**
Raporto pri la faritaj eldonoj kaj la projektoj : aperis en 2021 la bildstrio *Ĉiuj superherooj* (majo 2021) kaj la sciencfikcia novelaro *Sur bluaj planedoj* (septembro 2021).
Ankaŭ en septembro aperis *Cahier d'exercices Espéranto*, eldonita de Assimil.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

4.1 **Eldono kaj disdonado de paperaj dokumentoj de MLA** (Multlingva Akcelilo) **DISKUTO**
Raporto pri la projekto
Subvencipeto por financi la eldonadon de materialo por disdoni al lernejoj, kiuj deziros uzi ĝin.
Ni jam havas monon, kiu estis donacita por krei manlibron de Esperanto, sed tio ne estis realigita. Ni do povos uzi tiun monon sen alvoki por pluaj donacoj nun.
La ideo estas enpaĝigi la lecionojn haveblajn sur la retejo de lernu kaj senpage disdoni ekzemplerojn al instruistoj kiuj pretas provi la metodon en bazlernejo.
La enpaĝigitaj libroj konsistos el “instruista libro” kaj “lernanta ekzercaro” (+ tondendaj kartoj)

4.2 **FEI** **INFORMO**
Raporto pri la ĉi-matena kunsido de FEI (MD)
Jean-Claude Roy rezignis por reprezenti UFE ĉe FEI.
Renée Triolle, Pascal Villain kaj Michel Dechy nun reprezentas UFE
Mankas 2 kandidatoj : Gilles Tabard interesiĝas
(SAT Amikaro estas reprezentita de Vito Markov, Anne-Sophie Markov, Maximiliano Guerain, Elisabeth Barbay)
Elektitaj estas Jesper Jacobsen kaj François Lo Jacomo (mankas unu)
Celo de FEI estas konservi ekzamenojn kiuj zorgas pri la kulturo (male ol KER ekzamenoj), kaj pri la trejnado de instruistoj.
Estis diskuto pri ebla trejnado pri respondo al ĵurnalistoj.